

Heinrich Heine,  
La montvoĉo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Rajdant' malĝoje trotras tra  
Montval' sen iu cel':  
Aĥ, ĉu mi nun iras al karulin',  
Aŭ ĉu al la tomb-malhel' ?  
De l' val' resonis el:  
Al tomb-malhel' !

Kaj peze ĝemas la rajdant',  
Kaj diras li al si:  
Do iru vi al via tomb' -  
En ĝi ripozos vi.  
Respondas voĉo ĉi:  
Ripozos vi!

Kaj larmo rulas de lia vang'  
Pro veo en la kor':  
Trankvilon mi trovos en la tomb' -  
En paco kaj sen dolor'.  
Reeĥas el la for':  
Kaj sen dolor' !

*Traduko de la Germana poemo "Die Bergstimme" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984.*

*MR-118-1 / Arg-209-418 (2004-03-14 00:10:54)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romanoj“, n-ro II.*